

31 B^d Mariette
la 19^{an} de Dec. 1927

Kara Amiko,

Jen kelkaj vortoj al mia korespondinto neniam forgesita por de nove sendi al li miajn tut'korajn bondezirojn por feliĉa Kristnasko + prosperan Novjaron. Estu feliĉa, animkvieta, sana. Ke 1928 konduku vin al Antverpeno dum la epoko de belaj, varmaj tagoj.

Ĉu estas eble ke oni povos de nove revivi sunajn, varmajn tagojn kiam la frostaĵo + glaciaĵo ne estos konataj?

Hodiaŭ matene je la fenestro de mia banĉambro estis - 15° centigradoj + alie en la urbo estis -15°. Oni ne vidis similan vintron de post 1917, kiam dum la milito la soldatoj en la tranĉeoj vivis sian kruelan sorton.

Ĉe vi, sendube, estas ankoraŭ pli malvarme. Ĉe ni, tuta unu flanko (la maro) ne estas frostita, ĉe vi tutaj flankoj estas frostitaj + sekve la atmosfero estas pli malvarme¹. Tamen ĉi-tie estas tiu-ĉi nordorienta vento kiu estas terure malvarma.

Ni havas la hejtaparaton (chauffage central)² + ankoraŭ fajrojn en la kamenoj. En tiuj tempoj mia koro suferas pro la doloroj de malriĉuloj sen lito + sen manĝaĵo!!

Kiel vi fartas? Kion vi faras? Ĉu vi havas multajn procesojn? Mia edzo estas surŝarĝita je laboro + ĉiu vespere li estas okupita, ho ve! Morgaŭ, granda proceso kiu faris multe da bruoj pro la fameco de la kulpulo en la urbo. Estas skandalo (laŭ la urbo opinio) "afero de moroj" (kun knabinoj 11 + 10 jara³). Mi opinias ke estus afero por kuracistoj + malsanulejo. Sed, la kulpulo estas la prezidanto de la grupo de "rojalistoj" (reĝistoj) + la ĉefpolicestro estas ruĝa, ruĝa. Do estas afero politika !!

Estas la sezono de akceptadoj, de gastado, de baloj, k.t.p. Mi estas tre okupita pri ĉio + plie, mi faras tiom en la hejmo ankaŭ.

Mi ĝuis la viziton de mia korespondanto de 9 jaroj S^{ron4} Guerra el Meksikujo, en Oktobro, dum 5 tagoj. Poste mi vidis lin en Parizo dum kelkaj tagoj + li ĵus vizitis min por la fina adiaŭo antaŭ sia enŝipiĝo por Meksikujo. Li faris belan vojaĝon tra Eŭropo, vizitis vian landon⁵ Jugoslavion, Germanujon, Austrujon, Hungarujon, Belgujon, Italujon, Svisujon, Anglujon, Usonon, k.t.p.

Nun li forlasis Europon⁶ por Tampico kie li restos + laboros (Direktoro de la Poŝto) dum 3 jaroj. Li faris same en 1924. Lia edzino faris grandegan vojaĝon ankaŭ sed ne kun li. Ŝi ankaŭ vizitis min + enŝipiĝis en Boulogne - tute kiel en 1924. Vi konatiĝis kun ŝi en Wien. Kaj ambaŭ vojaĝas nur por viziti siajn korespondantojn.

Kiel fartas Eveĉjo⁷? Ŝi devas esti tiel⁸ ĝentila nunaĝe.

¹ ĉu "malvarma" ?

² ústřední topení

³ ĉu "jaraj" ?

⁴ ĉu "S^{ron}" ?

⁵ ĉu mankas komo ?

⁶ ĉu "Eŭropon" ?

⁷ manskribita noto "Evinjo"

⁸ noto je la komenco de la paĝo: "Pardonu tiujn malpuraĉojn, mi nur vidis ilin post la unuapaĝa skribado."

Mi ofte + ofte pripensas al vi esperante iam ricevi leteron kiu montros ke vi ne forgesas vian Prahon amikindon. Antaŭ hieraŭ mi rigardis la albumon de Prahaj vidaĵoj kiun mi havis en la bela alta ĝardeno. Ĝi ankoraŭ pli intense rememorigis al mi tiun belan neforgeseblan Kongreson!

Premante ambaŭ viajn manojn en amikeco mi sendas al vi miajn

plej sincerajn salutojn

Alice Sergeant